

1-a DIMANĈO DE ADVENTO – 29-an de novembro 2015

VIA LIBERIGŔO ESTAS PROKSIMA - komento al la Evangelio di p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 21, 25-28.34-36

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Estos signoj sur la suno, luno kaj steloj, kaj surtere angoro de popoloj teruritaj pro la muĝado de la tempesta maro, kaj homoj mortos pro timo kaj antaŭsento de tio, kio venos en la mondon. La ĉielaj potencoj estos renversitaj. Kaj tiam oni vidos la Idon de la homo venanta en nubo kun granda potenco kaj gloro.

Kiam okazos tio, ekstaru kaj levu viajn kapojn, ĉar via liberigŔo proksimas.

Gardu vin mem, por ke viaj koroj ne estu ŝarĝitaj de disipado, ebrio kaj zorgo pri vivrimedoj, por ke tiu tago ne venu al vi neatendite, ĉar ĝi falegos kiel kaptilo sur ĉiujn surterajn loĝantojn. Viglu ĉiam preĝante senpaŭze, por ke vi sukcesu eviti ĉion okazontan, kaj vin montri antaŭ la Ido de la homo.”

La evangelio de ĉi tiu dimanĉo, la 29-a de novembro, la unua de la Advento, estas forta kuraĝigo fare de Jesuo al sia sekvantaro, kiu estas malgranda grupo, ne kapabla sin defendi, ema al senkuraĝigŔo antaŭ la potencaj institucioj regantaj la socion.

Nu, la vortoj de Jesuo estas forta kuraĝigo. Fakte la piedoj de ĉiu potenco estas argilaj, pretaj por disfalo, baldaŭa aŭ fora". Ni legu kaj komprenu la hodiaŭan evangelion (Lk. 21, 25-36).

„En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj, „Estos signoj...”” Jesuo respondas al demando de siaj disĉiploj. Jesuo estis anoncinta la disfalon de la Jerusalema templo. Kial? Religia institucio misuzanta la nomon de Dio por ekspluati la popolon, la malriĉulojn, ne rajtas ekzisti.

Vivon Dio donas, ne deprenas. La Dio de Jesuo estas patro, kiu ne deprenas la homajn energiojn, sed disdonas la siajn. Kaj religia institucio ekspluatanta la homojn ne rajtas ekzisti. Tial Jesuo anoncis la disfalon de la Jerusalema templo, simbolo de tiu institucio.

Post tiu anonco la disĉiploj demandis (Lk 21, 7): *“Kiu estos la signo, ke tio estas okazonta?”*. Jen la respondo: *„Estos signoj ...”*, kaj Lia stilo estas profeta, citante Joelon: *“...sur la suno, luno kaj steloj”*. Suno kaj luno, en la tiam kulturo, en la pagana mondo, estis dioj, adorataj de la popoloj: Kio estas do la steloj?

Tiutempe ĉiuj potenculoj sin opiniis loĝantoj en la ĉielo: la faraono estis Dio, la romia imperiestro estis Dio aŭ ties filo. Ĉiuj potenculoj opiniis sin steloj.

Kaj nun Jesuo garantias, ke, danke al la evangelia anonco, ĉiuj tiuj potenco-strukturoj disfalos, unu post la alia *.....kaj surtere angoro de popoloj terurita pro la muĝado de la tempesta maro*”. Tio estas la disfalo de la regantaj imperioj, kiuj tamen certigis sekurecon kaj ordon. Sankta Aŭgusteno, sentante, ke ŝanceliĝas la Romia imperio, tiu mirinda strukturo, diras: *“Alvenis la fino de la mondo”*. Ne estis eble tiam imagi al si mondon sen la strukturo de la Romia imperio. Kaj la homoj ektimas, ĉar kio ŝajnis eterna, stabila, eterna, ne plu ekzistas. Kaj precipe en la religio, kio aspektis sankta, ne plu estas tia. Kaj Jesuo anoncas: *“...La ĉielaj potencoj estos renversitaj”...*. Kiu estas la ĉielaj potencoj? Laŭ la Evangelioj tio estas la Patro, Jesuo, la ido de la homo kaj la anĝeloj.

Kiuj do estas la uzurpantoj en la ĉielo? Ĝuste tiuj potenculoj, kiu atribuas al si diecon por regi kaj ekspluati la homojn. En la leteroj de Sankta Paŭlo iliaj nomoj estas *“tronoj, regantoj, princoj, povoj”*; ĉiuj tiuj nomoj memorigas la region.

Do "la ĉielaj potencoj", la regantaj potenculoj, la ekspluatantoj de la homoj *...estos renversitaj...* La anonco de la bona novaĵo de Jesuo montros la veran Dion, la falsaj dioj ne plu brilos, kaj la reĝoj kaj potenculoj, kies povo dependas de tiuj dioj, travivos la finon de sia regado.

"... *tiam oni vidos ...*". Rimarku: Jesuo ne diras "vi vidos". Kiuj estas tiuj "oni"? Tiuj ĉefpotenculoj, ĝuste samtempe kun la disfalo kaj polviĝo de sia povo, ekvidos la Idon de la homo. Tiu estas la nomo, kiun Jesuo donas al si mem, homo plene dia.: "*...venanta en nuboj...*", "*bildo de la dieco ...*" *"kun granda potenco..."*.

Samtempe kun la renverso de la potencoj, aperas la potenco de la Ido de la homo. Kun Jesuo komenciĝas la regado de la homeco, kaj ĉio nehoma estas malaperonta "*...kaj gloro*". La gloro de la Ido de la homo estas la senkondiĉa amo de Dio al sia popolo.

Kaj jen la vortoj de granda konsolo, granda espero kaj granda kuraĝigo. (Lk. 21, 22-31) "*Kiam okazos tio ...*" ne estas vortoj timigaj, sed gajigaj, kaj la sekvo estas *ekstaru kaj levu viajn kapojn...*, kie la kapo estas simbolo de la persona digno, "*... ĉar via liberiĝo proksimas*".

Ĉiuj reĝimoj kun jura kaj religia povo, kiuj, ne servas la homojn, sed ilin regas kaj ekspluatas, sendube malaperos. Kaj estas gravaj la postaj versikloj (Lk 21, 22-31), *De la fig-arbo lernu parabolon: kiam ĝiaj branĉoj jam moliĝas kaj ekaperas folioj, vi scias, ke la somero estas proksima. Tiel same, kiam vi vidos, ke tio okazas...* (tio estas la fino de Jerusalemo kaj la ekdisfalo de ĉiuj reĝimoj ekspluatantaj la homojn), *sci, ke la Dia regno estas proksima*".

La alternativa socio proponita de Jesuo, kies fundamento estas la apero de la Dia regno, realiĝos. Kaj ankaŭ la paganoj estos enlasitaj. Kaj nun Jesuo admonas: "*...Gardu vin mem, por ke viaj koroj ne estu ŝarĝitaj de disipado, ebrio kaj zorgo pri vivrimedoj...*". Li rememorigas la parabolon pri la semo, kiu ne fruktodonas, pro troa atento al la vivkondiĉo (Lk. 8, 14)

Kion intencas diri Jesuo? Se la disĉiploj akceptis la principojn de la pereonta socio maljusta, ili pereos kun ĝi. Tio pravigas la finan admonon "*Viglu...*, do, atentu:" "*... ĉiam preĝante senpaŭze, por ke vi sukcesu eviti ĉion okazontan, kaj vin montri antaŭ la Ido de la homo.*". Do ili ne adaptiĝu al maljusta socio, pereonta.

